Manfred Hausmann,

# Sommerabend

Der Berge goldnes Licht vergeht
im abendlichen Schattenreich.
Mit zitterndem Geblink entsteht
das Bild des Mondes auf dem Teich.

Gelösten Haares liege ich
auf der Terrasse, und mein Sinn,
mein Leben gibt der Stille sich,
gibt sich dem kühlen Mondlicht hin.

Ein unbestimmtes Wehen streicht,
nach Steinklee duftend, um das Haus.
Der Bambusschatten regt sich lsicht
und rauscht vom Tropfenfall des Taus.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Manfred Hausmann *(∗1898-09-10 – †1986-08-06).*

*Arg-994-2004 (2014-04-20 08:58:18)*

*La poemo estis origine verkita de la ĉina poeto Mèng Hàorán, kiu vivis de 680 - 740 p. Kr. Pri tiu vidu la retejon* http://eo.wikipedia.org/wiki/Meng_Haoran *respektive* http://en.wikipedia.org/wiki/Meng_Haoran*. Pri la herbo meliloto (germane: Steinklee) vidu la retejon* http://pharm1.pharmazie.uni-greifswald.de/systematik/6_droge/melilo-h.htm *kaj* http://www.docjones.de/wirkstoffe/steinklee/steinkleekraut-extrakt-2*.*

Manfred Hausmann,

# Somera vespero

*tradukita de Manfred Retzlaff*

De l' montoj ora lumo nun
foriĝas en vespera pac'.
Ekestas trema bild' de l' lun'
sur de l' lageto la surfac'.

Kun loza kap-hararo mi
sur la teraso kuŝas nun,
kvietas mia vivo, ĝi
sin donas al la lum' de l' lun'.

Flariĝas melilot-odor',
ĝi lante supreniĝas al
la dom' dum la vespera hor',
susuras jen ros-guto-fal'.

*Traduko de la Germana poemo "Sommerabend" de* Manfred Hausmann *(∗1898-09-10 – †1986-08-06) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2014-04.*

*Arg-994-2005 (2014-04-20 08:59:23)*

*La origina ĉina poemo troviĝas en* http://www.chinese-poems.com/m6.html*. Pri la herbo meliloto vidu la retejon* http://pharm1.pharmazie.uni-greifswald.de/systematik/6_droge/melilo-h.htm *kaj* http://www.docjones.de/wirkstoffe/steinklee/steinkleekraut-extrakt-2*.*